



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakelo:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

La Kristo pentrita de Velázquez el José M.^a Gabriel y Galán

*Dedicita al mia tre kara amiko
S-ro Manuel Vázquez.*

Li Kriston amadis,
Ĉar estis ĝi pli, ol kreaĵ' de l' genio!
En song', senkonscie,
Divene li trafis pentrotan la Kriston,
Ĉar nur en dormombroj,
Nin kaptas sublimaj vizioj,
Ĉar nur en dormombroj
Nin kaptas konceptoj pri Dio,
La lum' de l' grandeco,
Miel' de l' raviĝo...
Li Kriston amadis,
Ĝin naskis el fund' de l' animo!
Neeble sen ano revadi,
Neebla sen ama flameco l' inspiro,
Neebla la sent' sen ampuŝo,
Neebla sen am' l' artekscito,
Neeble sen amaj flugiloj flugadi,
Nek vivi sen amaj elspiroj.
Vidant' la sublima dormadis,
Dum revis l' animo,
Per revoj pri l' arto,
Per revoj pri Dio,
Ĉar ilin nur havas geniaj kreantoj,
Nur kiuj la fulmon de glora feliĉo
Ekvidas tra belaj ĉieloj la fendoj.
Kaj am', de l' anim' altirilo,
Al li de l' Ŝafid' la vizion alŝovis
De l' milda Martiro,
Al kruc' alnajlita
Kun dia la frunt' en dolora kuntiro,
Kun diaj l' okuloj duone fermitaj,
Kun diaj sufero-maldolĉaj la lipoj,
Kun dia la brilo senmova...
Pro am' al homaro mortinta la Kristo!
L' artist' tia vidis Lin, kia Li estis,
Samtempe Jezu' kaj Martiro.
Li amis Lin funde,
El kor' traskuita de flama pasio!
De l' sankta vizi' penetrita,
Kun diaj anĝelaj raviĝoj
Lirikaj, magnetaj ekstazoj,
Kun logaj ermitaj deliroj,
Kun ardo de l' drama flameco,
Kun febr' de svenigaj am-vibroj
Turnante memoron al homoj,
Sen danko, sen vido,
Malfortaj, frenezaj

Sub reg' de l' malnobl' aŭ perfido,
Alvokis li Belon Diecan
El kiu sin nutras genio,
Justuloj, sanktuloj
Korpuraj, bonkoraj la viroj.
Kaj venis sorĉite l' anĝeloj
Kaj helpis inspire l' artiston.
El ombroj kaj lumoj ĉielaj
Tuj al la paletro liveris provizon,
Starigis la stablon,
Almetis tolajon kaj fine penikojn
L' anĝeloj liveris ŝirante
La plumojn atlasajn el siaj flugiloj.
Kaj tiam la Majstro de l' Arto,
Sublime kreita por tio,
Malfermis l' okulojn ŝarĝitajn
Per ombroj el reva mistiko,
Penikojn li prenis tremante
Kaj pentris en dorm-senkonscio.
L' anĝeloj tuj surgenuiĝis
Kaj ŝvebis solene jen ĉiuj
Silentoj kaj ĉiuj malĝojoj...
Kaj l' Arta genio
Eksidis sur rand' de l' tolajo!
Kun febr' en la frunto, kun arda pasio
En brusto, kun dia rigard' en okuloj
Kaj mens' kun geniaj flamiĝoj
L' artist' trasorbis tolajon
per ombroj kaj lum' en kunmikso...
Ne estis la trajtoj pentrantaj senvive,
Sed estis reala turmenta batiĝo,
Kun varma la sang' de Jezuo,
Kun krimaj malbenaj postsignoj,
Kaj estis la voĉoj krientaj pri puno
Kaj ankaŭ kompaton petantaj ĝemkrioj...
Entute ĝi estis la krio ĉiela,
De l' mond' Dimortiga la krimo!...

Kaj sur la tolajon
Pentriĝis la songo de l' viro!

Li Kriston amadis!
Am' estas flugil' de l' Genio!

El la hispana lingvo tradukis,
VICENTE INGLADA.

«Frateco» esperanta Societo, esprimas per NIA Vivo al ĉiuj siaj anoj kaj al ĉiuj esperantistoj, sian plej korandeziron, ke la nova jaro 1933^a estu feliĉega al ĉiuj.

EKSTERLANDAJ PAGĜOJ

«SILURO KAJ TERTREMO»

Vi, karaj legantoj, ekmirus kaj ridetus, kiam vi trovas en la titolo la du objektojn, kiuj ŝajne aspektas interrilati tre malproksime aŭ esti eĉ tute senrilataj. Vi supozu, se vi volas, libere laŭ via bontrovo, vi ankaŭ pensu tion absurda, sed ne ignoru, nek forlasu ĉi tion antaŭ ol vi ellegos mian mallongan artikolon.

«Interne de la terglobo vivas unu tre kaj tre giganta siluro. Pro kolero ĝi ŝvingas de tempo al tempo sian ege diklongan voston tien kaj reen. Ho, terure, jen tertremo sur la tero!»

Jam de malproksima antikveco, de antaŭ pli ol du mil jaroj, tia ridinda infaneca superstiĉo enbatis radikojn sufiĉe profunden en popolan kapon ankoraŭ malkleran kaj iom post iom enfortikiĝis kun tempoj, dum kiam oni suferadis de tiel nomata kolero de la siluro. Ŝajnas, ke tiamaniere timo kaj intereso atingis la zeniton tuj post la plej terura tertremo en Ansei epoko (1855). Per eldonita desegnaĵo pri siluro, kiu siatempe fluge disvengiĝis kun granda sensacio, ni facile povas prezenti al ni, kiagrade oni estis ekscititaj maltrankvile.

Jam nun en la civilizita mondo neniuj havas eĉ malgrandan inklinon kredi tian frenezajon, ĝi jam perdis influon inter kamparanoj, kaj havas nur valoretan kiel apudikamena rememora rakonto inter vilaĝaj gemaljunuloj.

El kio do ĝermis tiu stranga legendo?

Estas ĝenerala leĝo, ke superstiĉoj naskiĝas de timo al io potenca aŭ tiel supozata. Homoj precipe malpi kleraj emas vidi en natura katastrofo koleron aŭ punon de Dio aŭ simila potenculo superhome. Preskaŭ ĉiuj mitoj havas tipajn ekzemplojn, kiuj pruvas tiun malfortan punkton de homa emo.

Ankaŭ la supredirita superstiĉo apartenus al tiu sama deveno sed bedaŭrinde mi ne povas respondi kial—ĉu hazarde aŭ pro iu aŭskultinda kaŭzo—oni elektis la siluron, kiel la potenculon de tertremo.

Japanujo estas la lando de beleco. Natura beleco konsistas en sintezo de belaj montoj kaj riveroj. La fakto, ke japanaj montoj elstaras elegante kaj grandioze, estas ĉefe dank al karakterizoj de vulkanoj, kiuj preskaŭ nenie mankas pro la vulkanzono trakuranta de nordo suden. La mondfama monto Huĝi apartenas ankaŭ al la samo kategorio. Sed tio ĉi estas nur ilia bela flanko. Ili kaŝas en si mem tre furiozan karakteron, kiu nude aperas tiam, kiam ili ribeleme erupcias. Ĉi tiu estas unu el gravaj kaŭzoj de tertremo. Kiel multe suferadis niaj antaŭuloj! Kiel grandegan

perdon kaŭzadis frekventaj terskuoj de pratempo ĝis hodiaŭ! Krakegoj de detruataj konstruaĵoj, krioj de pereantaj homoj kaj bestoj, flamoj de fajregoj ĉion forbruligantaj—vere ja timigaj, inferaj suferoj surteraj! Kaj tiu ĉi provoko de la naturo al la homa socio ripete okazis kaj okazos seninterrompe.

Parolante pri tertremo neniuj japanoj devas kaj povas forgesi mencii la plej tragikan tertremegon, kiu atakis la Kantoo distriktojn en la jaro 1923.^a Malgaja rememoro pri ĝi ankoraŭ restus sufiĉe freŝa ankaŭ en la koroj de alilanduloj kiuj bonvolis esprimi al ni sian afablan simpatian kaj doni malavare laŭeble helpon, por kiuj la tuta japanujo restos por ĉiam dankema. Nunjare la de Septembro estas la naŭa datreveno de tiu neforgesebla tragedio.

La statistiko pri sentebaj tertremoj okazintaj de la jaro 1923 ĝis 1932, montras al ni eksterordinarajn ciferojn (19.515).

Estas facile supozeble, ke tiel same staros stato ankaŭ en estonteco. Grava malfeliĉo de la homaro! Havante plenan konscion pri nebleco de forigo de ties kaŭzoj ni antaŭ ĉio devas direkti nin al rimedoj per kiuj ni povas malpliigi mizeron. Se vi severe demandus al mi, kion faras japanaj sciencistoj tiurilataj, tio estus tro turmenta por ili, kiuj senĉese sin okupas en studoj, esploroj, observoj, ktp., per sia tuta kapableco, kun ĉiuj streĉitaj fibroj. Tre bedaŭrinde ni tamen ne povas ĝis nun vidi ĝojindan rikolton, neniuj povis antaŭaverti atakon de tertremo. Mi ĉi tie devas forte akcenti por atentigi vin pri tio, ke antaŭvido estas la plej necesa por savi grandnombran vivon, de katastrofo kruela.

Rilate tiun ĉi punkton fakaj specialistoj daŭre elverŝadis energion. Kaj ĉiam ankoraŭ vane?

«Siluro kaj tertremo». Ni nun revenu al tiu stranga temo.

D-ro Hatai, profesoro de Toohoku Imperia Universitato, post fervora studado ĉe la apudmara laboratorio en Asamuŝi, Aomori gubernio, certigis, ke siluroj sin movas en neordinara maniero 12 horojn antaŭe de tertremo atakonta. Li povis per tio sukcese trafi ĉiun okazon. Ankaŭ Doktoroj Imamura kaj Nakamura, sismologia, aŭtoritatoj, vizitis la eksperimentejon, kie ili denove miris pro tiu rimarkinda frukto de senlaca laborado. Grava eltrovo meritplena! Nun tiu ŝajne bagatela legendo instigis kaj sugestis la scienciston fine al la sukceso. Ĝi solviĝis eksperimente kaj komencis havi apartan pli valoran signifon. Neniuj tamen sciis kial siluroj tiamaniere antaŭsentas, sed almenaŭ estas konstateble, ke tiaj malaltklasaj fiŝoj, birdoj, aŭ bestoj havas karak-

terizajn instinktojn specialajn, kiuj jam ĉe ni, homoj, forestas aŭ tute degeneris. Bonajn ekzemplojn ni povas vidi ĉe kolomboj, kiuj antaŭjuĝas veteron, ĉe musoj time forkuremaj antaŭ atako de fajrego, aŭ ĉe korvoj, kiuj nestas alte sur arboj pro antaŭzorgo en jaro de kataklismo.

Mi emfaze konkludas:

Oni ne forgesu, ke eĉ ŝajne ridindaj superstiĉoj kaj tradicioj iam pruviĝus sufiĉe indaj, kiel sciencaj studobjektoj.

Japanio.

MINORU JAMADA.

BATALADO

La vivo estas batalado, kaj la batalado alportas la netuseblan lumecon al niaj pensoj, saturante ilin je fortaj sed belaj emocioj, kiuj plibeligas ĝin per dolĉa suko renoviganta la energiojn kiuj plensatigas nian vivon por la ĉiutaga batalado,

kaj kiam parton de tiu batalado ni uzas por la beligo de nia spirito, invadas nin interna kontenteco, kiu nin supersatigas de la korpremece suferata dum la batalado, kiam oni sukcesis atingi la deziritaĵon;

kaj ĉiu akiro kiun faras nia cerbo, estas mezsigno, kiun ni metas en la longa vojo de nia vivo, kiu neniam devas halti, nur kiam la morto envolvos ĝin en la blanka kaj malvarma mortinto, kiu nin alkondukos al la eternaj kaj mallumaj regionoj, kie la paco kaj la ripozo neniam estas perturbataj;

batali por la kontentigo de nia stomako estas io tiel necesa por nia vivo, ke nedisputeble sen ĝi ni ne povus vivi, kaj al ni produktas kontentecon—kiu dubas pri tio?—, sed se ni portas la spiritan lumon kiu iluminas nian cerbon en ĉiuj scifontanoj, ĉu ĝi ne estas interna batalado kontraŭ ni mem kiuj multfoje deziras trankvilecon kiu ekdormigu nian malkvietan spiriton, kaj ke nia Mi ĝin deziras, dum oni perdas tiun tempodaŭron en vanaj revoj neniam efektivigontaj

kaj, kiam la ombroj ĉirkaŭantaj la cerbon forflugas por enpaŝigi la lumon kiu iluminas nian intelekton post la ilumino, ĉu tio kion ni sentas ne estas spirita ĝuado, kiu nin plenigas je fiereco kiam ni ekscias tion, kio estis de ni ignorata?

ĝui, estas la vivplezuro de nia fiziologia Mi kiu estas vulgara, sed la vivplezuro ne devas esti nur ĝui per niaj vulgaraĵoj sentoj, ne, sed la ellerno, la instruo, studi hodiaŭ, por instrui morgaŭ, paradokso de la vivo; Kiu scias!

la spiriteco de nia propra spirito devas esti ĉiam en konstanta progresema supreniro, sondante la misteran nokton kiu antaŭ nia mi sin prezentas kiam la rigardon ni direktas plensopire

al la morgaŭo pri kiu ni neniam scias kiel ĝi alvenos;

kaj se spiritan ĝuadon ni sentas ellerninte la deziritaĵon pli intensa ĝi estos se la ellernitaĵon ni poste instruos: ellerni la Esperantan lingvon estas io utila, neniu povas pensi kontraŭe, sed instrui ĝin estas io grandega, ĉar ĉiu homo kiun oni sukcesos trinkigi en la fontanoj de tiu bela lingvo, estas nova homo alproksimiĝanta al la granda internacia homa solidareco, kiu eble estas la sola rimedo kapabla post longa aŭ nelonga tempo forpeli la perforton kiu alportas la detruon trenante nin al la milita barbareco;

nur pro tio la misio de ĉiuj instruantoj estas grandioza; kaj, ĉu instrui ne estas batalado? nedisputeble batalado ĝi estas, sed tre bela batalado.

Zaragozo.

AGUSTÍN OLIVEROS.

FABELO

La gvidanto de blindulo

Iam, sinjoro ekskolonelo, kiu tre amis la bestojn, renkontis sur ia promenejo blindan almozulon, kiun gvidadis eta pudelo, kaj li diris al li kiel bela pudelo! Ĉu vi bonvolus vendi ĝin al mi?

La blindulo respondis: Tre volonte mi plenumus viajn dezirojn, mia sinjoro, sed ĉar mi ne havas parencon aŭ amikon, kiu volos gvidi min, mi ne povas vendi mia pudelon.

Sinjoro ekskolonelo rediris: Tio, kion vi diras al mi ne estos baro por ke vi vendu ĝin al mi, ĉar mi destino personon, kiu flegos kaj gvidos vin kaj plie mi prenos sur min la komision nutri vin. Se vi aprobas mian proponon, diru ĝin al mi morgaŭ. Pripensu tion.

La morgaŭan tagon, vespere, la blindulo iris ĉe la sinjoro kaj ploregante diris al li, ke li aprobas lian proponon, sed donace, ne vende.

La sinjoro alvokis sian edzinon kaj diris al ŝi: Tiu ĉi estas la blindulo kies estas la pudelo pri kiu mi parolis al vi hieraŭ nokte kaj kiun li donacas al ni.

La ekskoloneledzino ekkriis: Ha! Li estas mia preferato inter miaj malfeliĉuloj.

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn, la blindulo tuj rekonis la voĉon de sia protektantino kaj surgenuiĝis antaŭ ŝi petante de ŝi la manon por ĝin kisi.

La sinjorino prenis liajn manojn kaj starigis lin dirante: De nun estos preferinde ke vi loĝu en ia mansardo de tiu ĉi domo, kie ni loĝas; servisto nia flegos kaj gvidos vin, kaj plie vi ricevos nutraĵon kaj ĝuos ĉiutagan pension da kvardek spesdekoj por vestoj, tabako kaj amuzajoj.

La blindulo daŭris ploregante de emocio kaj fine, kiam li povis paroli, diris: tiu favoro estas troa, miaj gesinjoroj.

La sinjoro respondis: Ne, vi estas havonta tiom, kiom iu ajn el miaj servistoj. Akceptu tion kaj ni estos feliĉaj.

La blindulo fine akceptis kaj dankis al la gesinjoroj pro tiel granda favoro.

De kiam la blindulo transloĝiĝis ĉe la gesinjoroj, la sinjorino ĉiumatene, vizitadis lin kaj demandis ĉu li estadis, kontenta, kaj preskaŭ ĉiam la blindulo ekploradis ne povante respondi.

La sinjorino komunikis tion al sia edzo, tuj kiam ŝi lin vidis, aldonante, ke ŝi nescias kial la blindulo ploradis.

Ĝi estas tre simpla, diris la ekskolonelo: oni same ploras de ĝojo kiel de malĝojo. Plie, same vi kiel mi plenumis bonfarecon kaj tial ni devas esti trankvilaj.

Kiel bona vi estas, mia edzo! diris la sinjorino.

Vi estas pli bona ol mi, rediris la sinjoro, tial ke vi jam antaŭe helpadis nian blindulon.

La pudelo tre kutimis al la karesoj de siaj novaj mastroj, sed ĉar ĝi de antaŭ longe ne vidadis sian antikvan mastron, malĝojis kaj kelkfoje ĝia mastrino rimarkis, ke la pudeleto plende blekadis, kaj tio ĉi ŝin tre turmentadis.

Post kiam ŝi diris tion al sia edzo, tiu ĉi pripensadis kaj pripensadis ĝis kiam venis al li en la kapon la ideo pri tio, ke estus tre eble, ke la hundeto bedaŭrus la malaperadon de sia blinda mastro, kaj li tuj vokis la pudeleton kaj kun ĝi iris viziti la blindan gaston.

Post kiam la eta hundo flaris kaj rekonis sian antikvan mastron, ĝia ĝojo estis tiel granda ke ĝi multesaltinte kaj lekinte la manojn de sia blinda mastro subite grave malsaniĝis kaj mortis.

La blindulo same kiel la sinjoro ekskolonelo tre malĝojis kaj kiam ĉi tiu tion rakontis al sia edzino tiu ĉi diris: Nun mi komprenas, ke se la pudeleto plende blekadis ne estis senkaŭze, ĉar ĝi bedaŭradis la maleston de la blindulo.

La ekskoloneledzino rapidis viziti sian blindulon kaj vidante ke li estis ploreganta, diris lin: trankviliĝu, mia blindeto, trankviliĝu.

Kiel malgraŭ la konsoloj, kiujn la ekskoloneledzino al li malŝparadis, la blindulo ne plorĉesadis, ŝi diris al li: Kion vi deziras mia bona? Kaj li respondis: Ke vi ne forlasu min ĉar alie, mi mortos de mizero.

La bona sinjorino promesis, ke li estos ŝia preferata protektato dum ŝi vivos kaj ne alia; kaj ke por kiam ŝi mortos, li estos rekomendata al ŝiaj gefiloj, tio estas, ĉu ŝi vivos aŭ ne li ĉiam havos personon, kiu lin protektos.

La blindulo tute trankviliĝis kaj ankoraŭ kontente vivas ĉe siaj gebonfarantoj, al kiuj Dio premias iliajn bonfarojn permulte da sano kaj la respekto kaj karesemo de iliaj gefiloj kaj samurbanoj.

GRIZHARULO.

LA VORTARO ESTAS ĈE LA PRESISTO

Jes, karaj gesamideanoj: La esperant-hispana vortaro estas jam ĉe la presisto. Kaj eble kiam tiujn ĉi vortojn vi legos, la laboristoj prilaboras. Nur estis atenditaj la specialaj esperantaj literoj por komenci la presadon de la unua parto de la vortaro; tio estas: vortaro de oficialaj radikoj. La dua enhavos la komunajn neaprobatajn radikojn kaj la teknikajn.

La celo eldoni aparte la oficialajn radikojn estas duobla: unue ricevi verkon tre malkaran, kiu taŭgos por ĝenerala propagando, kaj due peni ke ĝi estu konsiderata kiel deviga fundamenta vortaro.

Se la sukceso estos atingata, kiel ni esperas, pri tiu unua parto, la vojo estos glata: tiam S-ro Inglada alpaŝos al preso de la nuna kajero —proksimume 80-aŭ 96-paĝa— de la vortaro hispan-esperanta por ke ĉiuj poru vidi ĝin kaj kompreni la helpindan meriton.

Do, antaŭen; Dankon, dankegon al ĉiuj sendintoj de kuraĝigaj vortoj kaj helpoj.

SCIIGĜOJ

Laŭ nia Regularo, okazos ĝenerala kunsido la dimanĉon 29^a Januaro de 1932, je la 11^a horo. Estos elektotaj por 1933-34 la postenoj de Prezidanto, Sekretario, Kasisto, Kalkulisto, 1.^a kaj 3.^a Voĉdonantoj. Oni petas de ĉiuj societanoj, ke ili ĉestu tiun kunsidon, okazontan ĉe loko, kiu estos difinita en la anonca tabelo de nia societo.

Oni starigis novajn grupojn en Graus kaj Teruel. Fondis ilin respektive la komataj pioniroj Sroj Joaquín Portella kaj Henriko Valle, kiuj ankaŭ gvidas esperantajn kursojn. S-ro Valle estas ankaŭ Delegito de U. E. A., en Teruel, kie multe laboradas S-ro Maraury, antikva kaj entuziasme pioniro. Ni korsalutas kaj gratulas ilin.

En Bialystok, naskiĝa urbo de la kreinto de Esperanto, Dro Zamenhof, fondiĝis Komitato por starigi statuon, kiu ĉiamigos lian memoron.

Tiu ĉi Komitato kreis duspecaj kotizajoj: unua de 0,50 ptj, malgranda, por ke ĉiuj esperantistoj povu kunhelpi la starigon, kaj alia dekoblo de la unua. Kiu elpagos tiun ĉi kotizajon estos enregistritaj sur la ora libro de la monumento. Frateco ricevas la mondonacojn.

SPRITAJO

Kelkaj masonistoj laboradas sur trabaro. Unu el ili falis teren. La aliaj parolis pri kiu el ili vizitos lian edzinon por sciigi al ŝi la malbonan novajon. Kartava laboristo oferis sin al la aliaj por tiu malgaja komisiono, ĉar li bone sciis plenumi tiun devon.

Li alvenis al la edzino de la mortinta masonisto kaj diris: —Mi... mi ve... venas por di... diri al vi ke la ja... jako de via edzo falis te... teren de la su... supro de la trabaro.

—Tio ne estas grava, amiko, diris ridetante la vidvino.

—Se... sed la plej gra... grave estis, ke via edzo sur... surportis ĝin.